JARRAPORTO DE 'EVIDENTE' 2012

(Nederlandlingve legeblas ankaŭ la Jarraporto de 2011; ambaŭ PDF-forme 1MB kaj 763 kB)

Planataj Misioj 2013 en Maŭritanio, Tanzanio, Rumanio kaj Bulgario; kuracisto alvokis ankaŭ por Etiopio.

Enhavo de la Jarraporto 2012:
1. Enkonduko
2. Ĝeneralaj informoj pri Fondaĵo Zienderogen (FZ)
3. Retpaĝaro
4. Projektoj Albanio, Kongo, Kaliningrado, Ukrainio, Rumanio, Srilanko
5. Adoptoj: Maroko, Maŭritanio
6. Financa Jarraporto: spezokonto, klarigoj
7. Kontakt-informoj

1. ENKONDUKO

Estimata leganto,
Antaŭ vi kuŝas la Jarraporto de la Fondaĵo “Zienderogen” (Evidente; FZ).
Ni celas kontraŭi blindecon kaj vidmalforton en ĉiuj malriĉaj partoj de la mondo. Teamo el optometriistoj kaj/aŭ okulistoj, kompletigata de (lokaj) tradukantoj kaj helpantoj, provas ene de tagdeko provizi plejeble da homoj per laŭmezuraj okulvitroj.
Ni ankaŭ havigas apogon per financoj, scioj kaj materialoj al institucioj kiel (blindul)lernejoj kaj malsanulejoj por kontraŭi (nenecesan) blindecon. Krome FZ adoptis plurajn blindajn infanojn, por ke ili povu viziti lernejon kaj havi ŝancon pri bona estonteco.

En 2012 ni organizis 6 misiojn, kie aktivis granda nombro da volontuloj por okulesplori centojn da infanoj kaj plenaĝuloj kaj, kie necese, provizi per okulvitroj aŭ plusendi al specialista helpo.
Pro tio infanoj kaj studentoj (ree) povas legi, gepatroj povas vivteni sian familion, instruistoj povas lecioni kaj tajloroj povas kudri.

Ni esperas, ke vi kiel 'bonfarulo' (esprimo de la karmemora Jacques Tuinder) volos plu bonfari por ebligi al ni daŭrigi la vivlaboron de Jacques Tuinder. Eble ne sammaniere, sed same varmkore por niaj prosksimuloj. Se denove citi Jacques: ni volas resti 'belmuzikantoj sen arĉo' (sur ĝi – aŭ fakte 'frotstango' – laŭ nederlanda diraĵo restas kremo, simbolo de memprofito).
Kun amika saluto,
George de Jong, prezidanto Jeroen Mulder, sekretario

2. ĜENERALAJ INFORMOJ PRI LA FONDAĴO ZIENDEROGEN

En 1966 Jacques Tuinder ekvidis faldfolion, en kiu legiĝis, ke tri el kvar blinduloj niaplanede nenecese malhavas la lumon en la okuloj. Tiu vorto 'nenecese' trafis lin. Li malkovris ke eblas por minimuma sumo (1 eŭro) adopti kataraktulon. Jen la komenco. Mondbonigisto, li ene de 19 tagoj mem lernis la internacian lingvon Esperanto. Sekvis mondvasta retaro, en kiu li povis dissemi la mesaĝon de espero.
Kaj ne por 'surdaj oreloj': liberiĝis financoj por subteni veturantaajn okulklinikojn en Afriko, oni konstruis blindullernejojn, fondis optikajn centrojn, ĉion ĉi rilate nenecesan blindecon..
Kaj kie jam malaperis la lumo, ĉiel oni provis ebligi vivi kiel plenpovaj civitanoj. Brajlaj maŝinoj, legaĵoj kaj papero ekvojis al blinduloj kaj malforte vidantoj en la plej multaj landoj de la 'dua kaj tria' mondo.
Kulmine la 30-an de septembro 1997 oni starigix la Fondaĵon Zienderogen (Evidente) por helpi adekvate kaj laŭcele.

Post la subita forpaso de Jacques Tuinder en junio 2011 komenciĝis nova periodo. La plej forta deziro de Jacques estis ke post lia eventuala forpaso plu ekzistu la Fondaĵo.
Se Jacques laboris preskaŭ sola, nun sep personoj deklaris sin pretaj plu tiri la jam nemalgrandan ĉaron. En la lastaj jaroj ili ja jam estis proksime ligitaj al la fondaĵo.
La nuna estraro de FZ estas registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Amsterdamo. La fondaĵo estas registrita kiel ANBI (senprofita asocio de ĝenerala intereso), rekonata de la imposta servo.

Konsisto de la Estraro de FZ ekde la 31-a de decembro 2012;
Prezidanto: George de Jong
Sekretario: Jeroen Mulder
Kasisto: Robert Jan Korteland
Membroj: Bram Bol, Rob Boon, Laurent Nouwen, Dan Simons.
En 2012 la estraro kunsidis 4-foje: 29 februaro, 16 majo, 26 septembro kaj 19 decembro.

4. PROJEKTOJ

4.1. ALBANIO

En 1991 finiĝis la soveta superrego en Albanio kaj poste oni fondis la Blindul-Institucion en Tirano. La estraro de FZ estis invitita por festi la 20-jariĝon de ĉi tiu institucio. Jacques Tuinder dediĉis sin al la realigo de nova blindullernejo en Tirano kaj la estraro tre scivolis pri ĝi.
George de Jong kaj Bram Bol vidis bone zorgatan kaj puran lernejon . Ĉiuj projektoj estis perfekte plenumitaj. Nun eĉ la ludkorto estas pavimita, taŭga loko por blindaj infanoj. La blindullernejo havas 65 lernantojn, el kiuj 27 tute blindajn kaj la ceterajn tre malforte vidantajn (interalie albinojn). La pliparto de la infanoj loĝas en la tuj-apuda internulejo.
La lernejo kaj la blindulligo volas efektivigi plurajn adaptojn al la konstruaĵoj, sed la nuna estraro opinias ke bontenado de (publikaj) konstruaĵoj ne apartenas al la kernaj taskoj de nia fondaĵo. Ni kontaktigis la lernejan ewstraron kaj blindulligon kun la (nederlanda) fondaĵo 'Wilde ganzen' (sovaĝaj anseroj).
Pliaj informoj ĉe:
http://www.stichtingzienderogen.nl/reisverslag/verslag-bezoek-blindenschool-tirana-2-tm-4-april-2012/

4.2. KONGO

La konga organizaĵo Aide-Vision laboras en Goma, urbeto de 150 00 loĝantoj, kie ne disponeblas okulzorgo. Malgraŭ la minaco de la ribelularo M23 FZ-grupo tamen decidis forveturi al la tumulta Orienta Kongo. En tagodeko ni plenumis pli ol 600 konsultiĝojn. Pro la bonega kunlaboro de la Aide-Vision-aktivuloj eblis atingi ĉi tiun grandan nombron. Oni antaŭe prepare elektis kaj poste la homojn nehelpeblajn por la nederlandaj optometriistoj vidis okulisto de Aide-Vision.
Pliaj informoj ĉe: http://www.stichtingzienderogen.nl/projecten/verslag-missie-oost-congo/

4.3. KALINIGRADO

Laŭ peto de FZ Robert Bos (optikisto), Frank Koole (okulisto), Rob Rijnja (optometriisto) kaj Karel de Vries (fakulo pri malforta vidpovo) la 25-an de septembro flugis tra Riga al Kaliningrado. Ilian helpon petis la tiea Invalida/Blindula Ligo. Tio kontinuigis la vizitojn en 2008 kaj 2010. La teamo estis tre produktiva helpante malriĉajn homojn kun monata enspezo de 150–200 eŭroj monate, ofte loĝantaj plurfamilie en apartamento. Multaj havas popolĝardenon. Propraokule ni trovis ke la diferenco inter malriĉaj kaj riĉaj estasa grandega. Restis sento de kontento, ke ni povis fari bonan laboron helpe de pluraj interpretantoj. Al 392 homoj ni okulmezuris kaj preskribis okulvitrojn. Kaj ne malmultajn ni plusendis al bezonata medicina helpo.
Informo: http://www.stichtingzienderogen.nl/projecten/verslag-kaliningrad-september-2012/

4.4 UKRAINIO
Oni konscias la malriĉon de la afablaj homoj, la belegan pejzaĝon, la malbonegajn vojojn, labori en primitivaj kaj malfacilaj cirkonstancoj, la intensan sindediĉon de la tuta teamo, la rezignacion de la loĝantaro kaj fine la dankemon ke ni povis fari la mision. Kunlabore kun la nederlanda Henri Nouwen-Fondaĵo ĉi tiu misio havis kapabligan celon: specialistoj estis klerigitaj kiel refrakto-specialistoj por povi poste mem organizi mision.
La misio havis glavon du-eĝan: por la instrukciado niu bezonis provulojn, kiujn ni ĉerpis el la malriĉa lokanaro. Tiel ni okulmezuris 464 personojn, disdonis 127 legovitroparojn kaj almezuris pliajn 198.
informo ĉe: http://www.stichtingzienderogen.nl/verslag-oekraine-april-2012/

4.5.RUMANIO
Ĉi-jare ni organizis du misiojn al Rumanio. La unua okazis en Transilvanio en vilaĝoj ĉirkaŭ la urbo Tirgu Muros.
Tri specialistoj, invitite de la Fondaĵo Apogo al Romaoj en Rumanio, iris al Transilvanio. El la raporto de Samantha Trumpie (studento pri optometrio): Rerigarde al ĉi tiu grandioza semajno mi povas diri ke estis tute aparta kaj fantazie bona sperto, apenaŭ vortigebla. Tion necesas mem sperti. Nekredeble ke tiel prtoksime de Nederlando povas ekzisti tia malriĉo. Apenaŭ ja imageblas ke homoj vivas sen fluanta akvo, en kabanetoj kunmetitaj el trovaĵoj, ĉevalĉare veturas sur tru-plenaj vojoj. Sed la infanoj aspektas ĝojaj kaj feliĉaj. Ili estas gajaj kaj tre tre dankemaj.
La dua rumana misio direktiĝis al Mircea Vodo kaj Dobromiro. En naŭ labortagoj la geedzaj paroj Leenders kaj Van Rijswijk, ĉiuj optikistoj, esploris 1 300 homojn kaj preskribis 900 parojn da okulvitroj.
Informoj ĉe: http://www.stichtingzienderogen.nl/projecten

4.6 SRILANKO
Kun FZ misiis Roekide kaj Elias Hossevoort al Srilanko, nome Batticaloa, Akkaraipatty, Akkaraiputtu, Thuraineelavanai kaj Arumugatha Kudiyiruppa: prononci povas ilin Elias. Ankaŭ ĉi tiu misio bone funkciis: oni preskribis pli ol 300 almezutritajn okulvitroparojn kaj havigis 600 tuj pretajn legovitroparojn.
Informoj: http://ww.stichtingzienderogen.nl/verslag-sri-lanka-september-2012/

5. RETPAĜARO:
En decembro 2012 post plurmonata preparado kaj konstruado enmondiĝis la unua retpaĝaro de FZ. Ĉar la papera novaĵletero ne plu estas komplete sponsorata, oni decidis malplioftigi ĝian aperon. Sed pro vastigo de la nova retpaĝaro donacantoj kaj ceteraj interesatoj povos resti plene informataj pri ĉiuj agaoj de FZ.
KIO NOVA?
Unue: La hejmpaĝo estas tute nove fasonita. Sub la fotego eblas retdonaci aŭ aboni la novaĵleteron. Sube vidiĝas superrigardo de la plej aktualaj projektoj, kiel la misio al Kaliningrad aŭ Srilanko. Sub la mtitolo “projektoj” aperas la plej freŝdataj novaĵoj, ekz. ke niaj belgaj kolegoj forveturis al Bangladeŝo, sed ankaŭ ke FZ kunlaboras en misio al Tajlando kaj ke aperis artikolo pri FZ en Fa-Med Magazine. Per la menu-trabo paĝosupra eblas navigi al ĉiuj presitaj novaĵmesaĝoj, al la superrigardo de la projektoj kaj al ĝeneralaj informoj de FZ. Sube troviĝas la 'piedaĵo' kun kontaktinformoj, kaj interesatoj tie povas elŝuti novaĵleterojn kaj fari sugestojn, eĉ aliĝi al misioj de FZ.

Ciferoj de 2012 (laŭ Google-analizo):
Nombro da vizitoj: 4 441
Nombro da paĝvidigoj: 14 457
Averaĝa vizitodaŭro: 00:02:42
Vizitantoj el Nederlando: 78,8%

(Bv publikigi kaj sciigi FZ – Esperante – pri la uzo de la materialo)